

Leterkesto-5, kaj kanzono de Feri Floro

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 decembro 08.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-29/SRI-1988-29-B-6-Claude-kaj-Andree-GACOND-Leterkesto-5-kaj-kanzono-el-Feri-Floro.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigas nian salutadon al la skribemaj geaŭdantoj.

A.- Ni salutas Jan KLOCEK en Wloclawek, Pollando kaj Helmer KOCH en Schöneck, Germanio orienta.

Cl.- Josef KONDOR en Neuwied, Germanio okcidenta, sendis laŭdojn, kiujn ni parte citas: "Jam estas longa tempo, ekde kiam mi ne skribis al vi, sed tio ne signifas, ke mi forgesis pri vi, ĝi estas simple signo de mia maldiligento. Dum februaro laŭ miaj notoj mi kaptis vin minimume 3-foje, dum marto 6-foje, dum aprilo 7-foje kaj dum majo 5-foje. Ĉiuj geparolistoj senescepte estas la plej kompetente elektitaj personoj ĉe Svisa Radio Internacia kaj meritas la plenan rekonon de ĉiuj aŭskultantoj."

A.- Saluton ankaŭ al s-ro G. KNORR en Gera, Germanio orienta.

S-ro M. KOOB en Dembach, Germanio okcidenta, informis nin, ke li povis ricevi niajn elsendojn tre bone dum sia ferio-restado en Patos, Cipro. Fidela aŭskultanto, ĉu ne!

Cl.- Karl KRAFT en Borotice, Ĉeĥoslovakio, skribis "Mi kun ĝojo konstatas, ke vi jam nun digne preparas la venontjaran datrevenon de naskiĝo de Edmond Privat"

Anton KRONSHAGE en Schwelm, Danlando, aprezis nian elsendon pri la fratoj BOREL.

Jiri LAUBE en Roudnice, Ĉeĥoslovakio aŭdis nian intervjuon de Ed BORSBOOM pri la ĉeĥa esperanto-verkisto Bubeniček.

A.- Saluton al Michaelo LEKAVSKI en Chelm, Pollando.

Jacek LISOWSKI en Jaslo, Pollando.

Lothar MAHN en Rottweil, Germanio okcidenta, malfacile komprenas la klarigojn de niaj radio-informiloj.

Cl.- Ni salutas Marie MARŠIKOVA en Humpolec, Ĉeĥoslovakio.

Eugen MATIRKO en Košice, Ĉeĥoslovakio, sciiĝis per unu el niaj elsendoj pri la tutsemajna kurso, kiun Giorgio SILFER gvidis en La Chaux-de-Fonds pri la verko de la hunagara poeto Emeriko Madách, *La tragedio de 1' homo*. Tiu kurso vekis fakte grandan intereson, kaj ni esperas povi speguli ĝin per aro da elsendoj, kiujn ni realigos kun Giorgio SILFER. Eugen MATIRKO aŭskultis kun intereso nian prezenton de la libro "Sub la tendo" de Bubeniček, ĉar li havis samajn aventurojn. Ni citas lin: "Tre kaptis mian atenton la pasintsemajna elsendo pri

la libro "Sub tendo de cirko". Mi havas similan sorton kiel Bubenîček. Se tio interesas vin, mi volonte okupiĝus pri miaj propraj aventuroj dum tiuj kvardek jaroj de stalina epoko! Se vi deziras ekscii detalojn pri mia sorto kiel esperantisto vivanta en Ĉeĥoslovakio, bonvolu tion diri al mi. Kvankam ne kiel verkisto, al tio mi ne havas talenton, sed kiel simpla homo kaj esperantisto ekde la jaro 1933. Per tio mi finas mian leteron kaj konfirmas la bonkvaliton de viaj elsendoj, kiuj estas en nia regiono perfekte aŭdeblaj." Ni volonte ricevos detalan raporton pri la aventuroj, kiuj venas konfirmi tiujn, kiujn Bubenîček priskribas en sia romano "Sub tendo de cirko".

A.- Saluton al Zdena MATYKOVA en Hradu Kralovic, Polando.
Kaj Gregôjo MEDOUZA, Otavo, Kanado.

Norbert MERKENS en Wuppertal, Germanio okcidenta, sendas tre regule aŭdraportojn, en kiuj li esprimas siajn vidpunktojn. Jen ni citu lin: Pri intervjuoj kun la usonano Roy McCOY li skribis: "La daŭrigo de la intervjuo kun Roy McCoy estis gajiga plezuro por aŭskulti. Fakte li nun rakontis pri tipe esperantistaj travivaĵoj, ekzemple renkontiĝo en trajno post legado en "Pasporta Servo"; En alia letero Norbert MERKENS skribis: "Via intervjuo kun la usonano Roy McCoy pri homaranismo montris, kiel homo dum sia evoluo ekhavas novajn sciojn kaj faras novajn konkludojn... Mi ĝis nun tamen opiniis, ke homaranismo ne estas "religio" aŭ io simila, sed pli ĝenerala idealo, laŭ kiu povas vivi ĉiu homo, sendepende de sia religia konvinkiĝo. Eble mi eraris? Eble vi iam karakterizos homaranismon laŭ ĝia strukturo kaj intenco.

Cl.- Fakte la esperantistoj ofte aŭdas la nomon homaranismo, sed ni povis konstati, ke malmultaj povas iom precize raporti pri kio temas. Tial ni opinias utile dediĉi kelkajn venontajn elsendojn al relego de eroj el la zamenhofa deklaro pri homaranismo, kiu multe influis Edmond Privat, kies centjariĝon ni festos la venontan jaron. Ĝuste pri Edmond Privat ankaŭ skribis Norbert MERKENS. Ni citas lin: "Mi aŭskultis kun vera intereso viajn vortojn pri la stilo de Edmond Privat. Estas por mi ekpuŝo legi verkojn de Privat el tiu ĉi vidpunkto." Ni atentigas niajn geaŭdantojn, ke la organo SVISA ESPERANTO-REVUO publikigis en julio 1988 la koncernen eseon de Henri VATRE pri *La stilo de Edmond Privat*. Tiun revunumeron ni sendos al Norbert MERKENS kaj volonte sendos al ĉiuj, kiuj ĝin petos tra la kanalo de la esperanto-fako de Svisa Radio Internacia.

A.- Jens MERKER en Cottbus, Germanio orienta, interesiĝis pri nia elsendo dediĉita al la verkisto Bubenîček.
Ni salutas ankoraŭ Anna MICHNEVIČOVA en Praha, Ĉeĥoslovakio.

Cl.- Kaj nun ni interrompu nian salutadon aŭdigante kanzonon el la kasedo Feri Floro. La kanzono titoliĝas : 'Rossaŭra'. Muziko : vidu la videon sur la paĝo :
http://www.esperanto-gacond.ch/Claude_Gacond_Radioprelegoj-1988.html

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND daŭrigos sian salutadon al la skribemaj geaŭdantoj. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014